

# Tagiĝo 28

*Cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈRS.  
Eldonas Dŭm osvĕty, odbor Esperanto, Opava – 1955/IV,  
adr.: Kuzník, J. Rooseveltova 17, Opava*

---

*Ni deziras al niaj legantoj  
ĝojan festojn Kristnaskajn kaj prosperan  
tutan jaron **1956 !!!***

*Nia devizo: "NE TIMU KAJ PENU – NI VENKOS!"  
VOKAS NIN BULĜARA ESP. JUNULARO!*

## Somera Esperantista tendaro en Bulgario.

Ni jam sciigis pri la restariĝo de la Esperanto-movado en Bulgario. Nun ni jam povas raporti pri reaktivigo de la bulgara esperantista junlaro. Al nia Centrejo venis letero, kies kopio estis sendita ankaŭ al Zvara en Bratislava, de la Junulara Fako ĉe Bulgara Esperanto-Asocio (Buly, Stalin 40, Sofia.) Ni citas el ĝi:

"Preskaŭ en ĉiuj urboj la Esperanto societoj restariĝis. Eblr vi povis legi pri nia sukcesa tutŝtata konferenco (11.9. en Plovdiv, kun 205 partoprenantoj el 55 lokoj, - rim. de red.) La venonta 32-a Bulgara Esp. Kongreso okazos en Vratza en julio 1956. Nia Junulara Fako intencas organizi antaŭ la kongreso junularan esperantistan tendaron. Nia Asocio jam agas por rekomenci la disaŭdigojn en Esperanto en Radio Sofio.

La Junulara Fako ekzistas de j. 1947. Dum 1948 kaj 49 ni orgagnizis du labortaĉmentojn, kiuj partoprenis sukcese la junularbrigadistan movadon. Nun ni planas grandskalan propagandon por Esperanto inter la junularo kaj la soldatoj. Ni traktos kun eksterlanda fako de C.K. de Dimitrova Asocio de la Popola Junularo. Ni jam ricevis pri tio konsenton. Dum la venonta nacia kongreso ni okazigos kunvenon de Junulara Fako. Ni invitos oficiale ĉeesti membron de C.K. de D.A. de la Popola Junularo.

Ni deziras havi kun vi daŭran kontakton. Ni povas interŝanĝi opiniojn, spertojn, sugestojn, k.t.p. Ni ege petas vin informi nin detale pri via ĉi jara esperantista Tendaro, ĉar ni deziras organizi tian. Se estas eble, sendu al ni vian jarraporton. Atendante vian respondon ni kamarade salutas vin."

Ni ĝoje salutas la renaskiĝon de la bulgara esperantista junularo. Nia Centreja preparas detalan respondon el JF de BEA eble kun fotoj. Ni tamen alvokas la partoprenintajn de SET priskribi al la bulgara junularo sian personan impreson pri la tendara instruado kaj vivo. Tio farus nian respondon ankoraŭ pli interesa.

# JUNULARA INTERPAROLADO OSTRAVA

La alparolo de s-ano Jar. Mařík, ĉefdelegito de E-Junularo en ĈSR, okaze de regiona kunveno de junularo en Ostrava - 30.10.1955.

Karaj gesamideanoj!

Unue, mi petas vin senkulpigu mian malĉeeston en via regiona kunveno. Tamen kredu, ke miaj pensoj estas dum la nunaj horoj ĉe vi. Akceptu, karaj gesamideanoj, mian sinceran saluton en la nomo de la Esperantista Junularo en Ĉeĥoslovakio kaj la deziron pri harmonia kaj fruktoriĉa traktado en via labor-kunveno.

Ni memoru, ke ni staras en la nuna tempo sur la sojlo de nova epoko por Esperanto. Laŭ diversaj gravaj signoj la tempo de oficiala malfavoro en la popol-demokrata landaro al Esperanto ŝajnas jam esti pasinta. La subita interesiĝo de diversaj sovetiaj aŭtoritatoj kaj la fondo de Sovetunia Esperanto-Societo, laŭ iniciato de eminentaj membroj de la Sovetunia Akademio de Sciencoj, kaŭzas revigliĝon de la Esperanto-Movado en la popoldemokrataj landoj. Ni vidas tion precipe en Bulgario, kie restariĝis la landa Asocio, kursoj de la lingvo okazas eĉ en universitato, la partia ĉefjurnalo anoncas programojn de esperantistaj kunvenoj, kaj la bulgara komitato de pacdefendantoj sendis je ŝtata kosto esperantistan delegiton al la nunjare okazinta tutmonda porpaca renkontiĝo en Helsinki. En Hungario okazis antaŭ nelonge, post multaj jaroj, esperantista landkunveno kaj estis fondita la unua oficiala Esperanto-rondeto en Budapeŝt, en kiu partoprenis i.a. Baghy kaj Kalocsay.

La Asocio de Esperantistoj en Pollando ricevis de la oficoj lukse ekipitan oficejon kaj la registara komitato por jubileaj festoj de Mickiewicz decidis eldoni baldaŭ verkojn en Esperanto. La pola Asocio ĵus aliĝis kiel landa asocio al la Universala Esperanto-Asocio. La esperantistoj en Sovetunio, kiuj dum la ĵus pasintaj longaj jaroj restis fidelaj al sia ideo, salutis la novan tagiĝon por Esperanto por seriozaj klopodoj refondi la Esperanto-movadon en la Sovetunia Socialista Respublikaro. La korespondado en Sovetunio venis sur normalajn relojn kaj oni ricevas de tie poŝtaĵojn post nur kelkaj tagoj. Laŭ atesto de D-ro Jar. Jermář, ĉeestinto de la Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Varsovio, tiun ĉi festivalon salutis jam kelkaj kluboj el Sovetio kaj iu "Armena Esperanto Junularo". Detalojn pri tio, ĉu tiuj kluboj jam ekzistas oficiale, ni ankoraŭ ne konas. Tamen ni ĉiuj komprenas, ke la subita reapero de Esperanto en Sovetunio faras nian propran por- kaj per- esperantan agadon kvazaŭ laŭleĝa kaj donas al ni efikan armilon kontraŭ la skeptikuloj kaj falsaj profetoj. Ni memoru – efektive memoru – kaj propagande uzu la konstaton de E. Bokarev, supera scienca laboranto de la Lingvistika Instituto de l' Sovetunia Akademio de Sciencoj, kiun li komunikis al nia tutŝtata konferenco en Otrokovice: La opinio pri tio, ke ĉio rilata al Esperanto estas konsiderata en Sovetunio kiel kosmopolitismo, estas legendo. - Nun, krom la jam fondita Sovetunia Esperanto Societo, oni preparas la fondon de organizita Esperantista pacmovado en USSR. Mi konsilas, ke ni kontaktu tre ofte kun la sovetiaj esperantistoj kaj interŝanĝu spertojn pri nia laboro kaj esperantista pacbatalo. Mi estas informita, ke sovetiaj esperantistoj tre ŝatas scii pri niaj laborspertoj kaj pro tio ili atente legas ĉiun leteron kaj cirkuleron el Ĉeĥoslovakio. Kiu legas la Esperantajn cirkulerojn de ĈSR, scias ekz., ke el la urbo Kujbyŝev oni petis pri diversa materialo, precipe pacbatala, por ekspozicieto, aranĝota aŭtune en granda uzino en tiu urbo. La plej lasta novaĵo pri Sovetunio estas: U.E.A. transdonis, laŭ diplomatia vojo, al la Sovetunia registaro la rezolucion de la 40-a Universala Kongreso en Bologna, en kiu oni interalie petas la registarojn de la landoj, en kiuj ne ekzistas Esperanto societoj, helpi ilin fondi aŭ restarigi.

La ĉefaj oficialaj aŭtoritatoj en nia lando ankoraŭ ne esprimas sian sintenon al la ŝanĝo de opinioj pri Esperanto en Sovetunio. Tamen la malpli superaj instancoj en pluraj lokoj jam reviziis sian sintenon kaj adaptiĝis al la nova situacio en Soveta Unio. Fakte – senutile ĝin tro akcenti – certe ĝojiga por ni. Mi ne mencias la diversajn sukcesojn, atingitajn en la lasta tempo - pri ili sufiĉe raportis la lasta numero de nia, organo "Tagiĝo". Mi tamen menciu almenaŭ unu: ĝi rilatas al la

centra literatura gazeto ĉeĥoslovaka, "Literární noviny". Tiun ĉi gazeton legas ĉiu klera homo en nia lando - literaturistoj, universitataj profesoroj, sciencistoj, artistoj, kaj ĝenerale la homoj de la kulturo. La klubo en Praha sufiĉe ofte kontaktas kun ĝia redakcio, kaj informas ĝin pri porpaca laboro de ĉeĥoslovakaj esperantistoj, precipe, - ĉar ĝi estas literatura gazeto - sur la kampo de la kulturo. Kaj tiu laboro vere ne estas malgranda, male, admirinda. Temas precipe pri ofte aperantaj tradukoj de ĉeĥoslovakaj literaturaĵoj pere de Esperanto en la ĉina lingvo. Kion jam faris la ĉeĥoslovakaj esperantistoj ekzemple por diskonigo de la ĉeĥoslovaka literaturo en Ĉinio, tion ankoraŭ ne kapablis nia tuta Akademio de Sciencoj kun sia Orientala Instituto.

La redaktoro de "Literární noviny" kun granda intereso ĉiam aŭdis pri nia peresperanta kultura agado, por kiu ni plenumas unu el la partoj de la rezolucioj de la Tutmonda Pac-Konsilantaro pri "interŝanĝo de kulturaj valoroj", - sed ili publikigis neniun raporton en sia gazeto. Ili estis treege interesitaj de la fakto, ke ĉkz, la "Bapto de caro Vladimiro" aperis per Esperanto sur la Kanaria insularo. Jukis ilin la deziro iel komuniki tiun ĉi interesaĵon al la ĉeĥoslovaka publiko - sed kiel?, en la tempo kiam la vorto "Esperanto" estis "tabuo" por Literární noviny, t.e., laŭ ilia opinio, malpermesita por ĝin prononci, publikigi? Fine ili trovis salomonan solvon kaj publikigis raporteton en la j. 1954, ke la "Bapto" aperis sur Kanariaj Insuloj, ne menciante la lingvon. Kaj tiel por la legintoj estiĝis la demando: en kiu lingvo? Ĉu en "lingvo kanara"? - Sed en la lastaj tagoj la situacio ŝanĝiĝis ankaŭ en "Literární noviny": Antaŭ unu monato ĝi presis sciigon pri preparata eldono de „Sinjoro Tadeo“ en Esperanto kaj pri fondo de Sovetunia Esperanto Societo.

Iu eble pensas, ke mi tro preparolas tiun ĉi afereton. Sed mi kredas, ke ĝi ne estas afereto, male grava duonoficiala rekono de la faktoj, eldevigita de la senlacaj klopodoj de tiuj esperantistoj, kiuj neniam perdis sian kuraĝon. Por la ĉeĥoslovaka „klera mondo“ estas vere pensiga tiu informo pri Sovetunio kaj Esperanto.

## JUNULARO -----

Nia junularo estas grava elemento en la ĉs. esperantista movado. El aliaj landoj ni aŭdas plendojn, ekz. nunsemajne el Svedlando, ke mankas la junularo, la nova sango de la movado. Ni en Ĉeĥoslovakio estas multe pli feliĉaj en tiu rilato. Sed rigardante la jarojn antaŭ nelonge pasintajn, ni devas klopodi refirmigi niajn vicojn kaj plivigli la aktivecon, pri kiu ni ne povas esti plene kontentaj. La gvidadon por nia plua agado donas la rezolucio, kiun ni akceptis dum la junulara landa jarkunveno en Otrokovice. Ĝiaj ĉefaj eroj estas: Direkti nian laboron al la lifortigo de la tutmonda paco por pli proksima kunlaboro kun la lokaj packomitatoj; plifortikigi nian lingvan nivelon; organizi publikajn kursojn de Esperanto kaj varbi novajn anojn.

Mi kredas, ke estas pli facile varbi novulojn ol teni daŭre la intereson de la varbitoj. Ni devas tiel aranĝi nian kluban vivon, ke ĝi estu sufiĉe riĉa kaj interesa, samtempe instrua kaj tiel kapabla plueduki la novbakitajn anojn. Se ni sukcesis en tio, ni ĝuas la fruktojn: la iamaj novuloj venas en la klubojn kvazaŭ en sian hejmon, ĝis tiuj el ili kapablas helpi en la organizado de la kluba vivo kaj preni iom de la ŝarĝo, kiu pezas sur la ŝultroj de unu aŭ kelkaj aktivaj klubanoj. Mi ne povas detale pritrakti ĉi tie la metodojn, kiel procedi en la plivigliĝo de la kluba vivo. Tro bonajn konsilojn, kiel aranĝi la klubajn programojn, ni trovas en la 27-a numero de "Tagiĝo", verkitajn de nia kultura delegito.

Gravan rolon en la kluboj devas ludi precipe la frekventintoj de nia edukejo de junaj esperantistoj, t.e. de Someraj Esperantistaj tendaroj, speciale C kaj D- diplomitoj.

Ĉe tiu okazo ni ne povas preterlasi specialan mencion pri la lasta 27-a numero de nia "Tagiĝo". Ĝia aspekto kaj ampleksa, valora enhavo estas gratulinda rezulto de klopodoj de ĝia redaktanto kaj de samideanoj en Ostrava. Ni devas propagandi nian centran junularan organon inter la junaj membroj. La nuna nombro da abonintoj - iom pli ol 100 - estas tro malgranda.

Kio okazis en la vivo de la esp-ista junularo post la lasta jarkunveno? Pri tio ni sciiĝas el raportoj de la regionaj perantoj. La roto de la regionaj perantoj kompletiĝis kaj estas nun jena:

1. Praha kaj nordokcidenta Bohemio: Vlad. Novotný en Praha

2. Suda Bohemio: Libor Křivánek en Písek
3. Plzeň: Josef Hořejší
4. Orienta Bohemio: Karel Franc en Pardubice
5. Suda Moravio: Olda Kaláb en Brno
6. Olomouc: Karel Fabián
7. Ostrava - Gottwaldov: Drah. Kočvara el Ostrava.

Regulajn raportojn ĉiumonate sendas ĝis nun la reg. peranto en Praha. Po unu raporto sendis Plzeň, Pardubice, Brno, Olomouc. Neniun raporton sendis: Písek kaj Ostrava.

El la raportoj ni sciigas:

Reg. peranto Praha: Dum la lasta somero la junularo en Praha ricevis sian esp.-istan bapton en unuafoja konversacio kun eksterlandanoj. Ĝi sukcesis tre bone. La klua vivo bone rekomenciĝis en nova klubejo kun bona programo. Mi citu la publikan eldiron de s-anino Eva Suchardová, membrino de la "Verda Ĉaro de Julio Baghy", kiu en la nuna semajno vizitis la junularan klubvesperon: "Mi jam longe ne vidis tiel seriozan laboron. Ni povas esti fieraj pri nia kluba junularo." La junularo en Praha preparas "Nikolaan vesperon" kaj regionan konferencon junularan en Praha por la 26-a kaj 27-a de novembro. Ĝi invitas vin sincere al partopreno.

La grupo Most estis sufiĉe vigla. Okazas tie kurso; dum somero oni tendumis dimanĉe sur la insulo en Ohře. Ĝi estas la plej vigla rondeto de la minista klubo OKH-Most.

Pri Děčín, Litvínov, Košťany u Teplic, Počepice u Sedlčan, Županovice, ni ricevis neniun raporton. La 25-an de sept. la EK en Praha aranĝis tre sukcesan ekskurson per speciala aŭtobuso al Karlovy Vary, kiun grandparte partoprenis la junularo. Okazis prepara kunveno por fondo de grupo en K. Vary.

La reg. peranto en Pardubice /s. Franc/ raportis,: En Pardubice la aktiveco ne estas kontentiga. Okazas regulaj kunvenoj de septembro kun kurso. Lanškroun rekunvenas ĉiun duan ĵaŭdon kaj gvidas A- kaj B-kurson.

Jablonec n. Orlicí kaj Chrudín dormas.

La reg. peranto en Plzeň /s. Hořejší/ raportis, ke la grupo en Plzeň kunvenas en privata loĝejo. Ĝi traktas kun uzina klubo por fariĝi ĝia rondeto.

Brno havas novan regionan peranton: estas 26-jara konstru-laboristo Olda Kaláb. Ŝajnas ke li serioze prenis sur sin la taskon de regiona delegito. Li prezentis sin (letere) al la ĉefdelegito, priskribinte sian ĝisnunan vivon kaj sportojn. Lia devizo estas simpatia: "Ne timu kaj peni!"

Pri la junularo en Brno ne necesas diri tro multe: ĝi apartenas inter la plej bonajn. La tuta junularo partoprenis aŭ en SET, aŭ en Doksy. Cink gvidas C-kurson, Werner D-kurson.

Třebíč: meritas dankojn pro la sukcesa aranĝo de la nunjara Somera Esp--ista Tendaro en Chvalatice apud Vranov, en kiu partoprenis preskaŭ 150 personoj. Okazas tri kursoj (2 el ili gvidas prof. Kilian, unu s. Pollnauerová). Oni promesas iom limigi la amuzan parton de la kunvenoj por dediĉi pli da tempo al lingva perfektigo.

Žďár n. Sáz.: aranĝis Esp.-ekspozicieton dum 6 semajnoj. La rezulto estas 30 novaj kursanoj. La kurson kaj la kunvenojn gvidas nia estinta blinda s-ano Březina, partopreninto de SET. La junaj kursanoj preparas desegnaĵojn por lernejoj en Anglio. Okaze de la kurs-komenco paroladis s. Echtner el Praha. S-ano Březina komponas kanton pri la Somera Esp-ista Tendaro. Jiří Vyšín kaj Jaroslav Vašátko senpacience atendas venon de kompetenta Junular-gvidanto, por ke li helpu al ili fondi en Žďár novan Junular-grupon ... Forĝu tiun feron baldaŭ, dum ĝi estas ardanta.

Svitavy: La rondeto estis akceptita en la uzinan klubon de SVITAP. Rýznar gvidas kurson kun 28 partoprenantoj. Kunvenoj ĉiusemajne. - Dano vizitis rondeton.

Kroměříž: ne sendis raporton.

La reg. peranto en Olomouc /s. Fabián/ ne sendas raportojn. La nova komitato de la junulara grupo mem en Olomouc raportis pri jarkunveno je la 13-a de septembro. Ĝi planas bonan agadon. Nova grupestro estas Břetislav Nevrlý, sekretario Líba Látalová.

Novaj rondetoj fondiĝis en Jeseník kaj Bruntál. En Bratislava fondiĝis grupo de esp-ista junularo. Enigmo estas, kial la nova grupo en Poprad, fondita ĉe OB en somero, ĵus estis disigita. TKKE jam intervenis en tiu afero.

Tiaj estas la novaĵoj, kiujn ni eksciis laŭ ricevitaĵaj raportoj. Mi alvokas tiujn regionojn delegitojn, kiuj ne sendis sian raporton, ke ili pliboniĝu kaj raportu al ni ĉiumonate.

La Centrejo preparas demandaron /"informliston"/ kiun ĉiu grupo plenigos kaj resendos al la Centrejo. Ĝi servas por kontrolo pri la stato en niaj grupoj kaj kiel fidinda fonto de administraj sciindaĵoj.

Fine ni raportas, ke la Tutŝtata Kultura Komitato Esperantista decidis eldonadi propran cirkuleron: "TKKE – informas" en kvanto de 500 ekzempleroj. La junulara Centrejo ricevis 50 ekzemplerojn, kaj sendis ilin al la regionaj perantoj kun la peto dissendi ilin al la grupoj /delegitoj/. Ni esperas, ke la distribuo jam okazis. "TKKE – informas" certe eldonata por siaj kaj grupaj funkciuloj. Ĉiu ricevinto havas la taskon diskonigi la enhavon al sia grupo.

Salutas vin ĉiujn  
via Jaroslav Mařík  
ĉefdelegito de Esp. Junularo

El la Junulara konferenco en Ostrava ni alportas ankoraŭ tre valoran diskutitan kontribuon de s. Novobilský Vl. nia

## KULTURA DELEGITO

Permesu al ni diri, karaj geamikoj, kelkajn vortojn, pri la situacio en nia junulara movado en ĈSR nun!

"Nia laboro promesplene evoluas" - tiel mi povus komenci paroli pri mia postferia agado. Kaj vere legante raportojn el diversaj lokoj, ni konstatas, ke preskaŭ ĉio niaj gesamideanoj kun fervoro eklaboris kaj jam atingis unuajn sukcesojn. Ĉi tiun entuziasmon laboran multe subtenis impresoj kaj lernitaĵoj el SET kaj ankaŭ lastaj novaĵoj pri la sukcesoj de Esperanto en diversaj landoj.

En septembro ni ricevis unuajn ĝojigajn sciigojn: Fondo de la Junulara grupo en Karlovy Vary, kun 16 membroj.

S-ano Hršel Zd. el Hradec Králové proponis kunlaboron kun nia junulara movado. Li havas studentan rondeton kun 6 homoj - do bonan fundamenton por nova Junulara grupo en tiu ĉi urbo. Ni kun ĝojo aŭdis ankaŭ pri la fondo de grupoj en Bruntál kaj Jeseník. Al tieaj gesamideanoj ni kore gratulas kaj deziras sukcesplenan agadon.

En malnovaj grupoj ni laŭdu speciale Junularon en Ostrava, kiu denove pruvis sian laboremon kaj organizan talenton kaj modele preparis sian Interbabiladon kaj Seminarion. Apartan ĝojon kaŭzis al ni sciigo el Bratislava, kie junularo fondis novan grupon kaj laboras kun vera elano. Junulara grupo en Olomouc bone komencis sian aŭtunan laboron. Ĝia nove elektita komitato informis Centrejon pri siaj laboro kaj perspektivoj.

Junularo en Praha vivas tre intense, kiel vi aŭdas en loka raporto. Ĝi preparas por novembro Nikolaan vespereton, kiu estas ĉi jare vere lukse aranĝita: en Palaco Fenix en Václavské náměstí, kun orkestro altnivela programo. Dimanĉe okazos regiona junulara konferenco.

Ges-anoj en Plzeň meritas ankaŭ nian atenton, ĉar ili batalas per sia propra vojo, nedependa de la loka klubo. Ni esperas, ke ili sukcesos trovi sian propran klubojon, kiel nin informis s-ano Hořejší. La verda flamo ekflagris ankaŭ en Žďár nad Sáz., kie bonege agas s-ano Březina, kiun ni konas el la tendaro.

Agrablan surprizon preparis por ni Junularo en Opava kaj precipe s-ano Kuzník, kiu helpe de ostravanoj sukcesis eldoni nian centran cirkuleron en vere impona vesto, kiu surprizis ĉiujn en nia respubliko.

En tiu nova Tagiĝo estis publikigita konkurso inter Junularaj grupoj. Temis pri traduko kaj originala verko pri militeruraĵoj. Tiu dua tasko estis sifiĉe malfacila. Mi atendis, ke ni ricevos kiel kutimo kelkajn tradukojn sed maksimume 10. Jes, tiujn dek ni ricevis, poste venis pliaj, ni estis surprizita kiam venis da ili 15, poeto 20. Mia surprizo kreskis kun kreskanta nombro konkursaj taskoj. Baldaŭ ni havis jam 25, poste 30,35,40 kaj fina nombro estas 40 taskojn!

Tio estas, karaj amikoj, nombro nenian atingita kaj ĝi atestas pri tio, ke niaj grupoj kaj anoj

vivas kaj vokas labori. Speciale tiuj kontraŭmilitaj taskoj nin surprizis, ĉar ili estis ĉiuj tre altnivelaj kaj atestas pri tio, ke pluraj talentaj rakontistoj troviĝas inter ni!!

La manko de la konkurso estis, ke neniu el Slovakio partoprenis ĝin, kaj ke Junularo en Pĕřerov kaj Pardubice tute ne respondis konkursan alvokon de la Junularo en Praha kaj Opava. Tamen la konkurso montris sian aktivecon kaj ni instigas vin ĉiujn: partoprenu venontan konkurson kaj montru, ke ankaŭ via Junularo volas enviciĝi inter aktivajn grupojn!

Tio estis koncize dirite, sukcesoj el pasintaj du monatoj.

Nun permesu al mi skizi antaŭ vi kelkajn proponojn, kiamaniere ni organizu nian laboron!

Nia ĉefa tasko estas: celkonscie studi la lingvon, por ke ni povu ĝin libere uzi en parola rilato aŭ por lega celo. La situacio jam ŝanĝiĝis kaj mi havas ĉiam kaj ĉiam pli da eblecoj paroli kun fremduloj. Rememoru nur Spartakiadon kaj Otrokovice. Kaj ni asertas, ke tiuj eblecoj kreskas!

Pro tio necesas fervoro studi la lingvon, ĉar estus por ni domaĝo kaj honto, kiam ni renkontonte fremdulon ne povus libere interkompreniĝi!

Kiamaniere ni studu Esperanton:

1. enla grupo ni organizu studajn rondetojn;

2. legu librojn kaj gazetojn. Seds legu kun krajono en la mano kaj ĉion nekonatan tuj elskribu kaj ellernu.

3. Mem skribu kaj verku, ĉar tio estas plej bona maniero kiel perfektigi en la lingvo. Viajn verkojn vi povas sendi al Tagiĝo, kiu volonte korektos erarojn kaj represos ĝin. Krome vi povas viajn kontribuojn sendi al Juna Voĉo, slovakia cirkulero. Vi lernas ankaŭ partoprenante diversajn konkursojn. Ne diru, ke vi ne havas tempon. Duonhoro sufiĉas kaj vi multon gajnos. Konkursojn organizas Tagiĝo kaj Juna Voĉo. Informiĝu pri ili kaj nepre partoprenu.

En viaj lokoj organizu Esperantajn kursojn kaj modele gvidu ilin. Ne forgesu antaŭ ĉiu leciono enmeti kelkajn vortojn pri Esperanto, ĝia celo, internaciaj sukcesoj – ekz. pri Unesko, Sinjoro Tadeo, kiun eldonas ŝtata pola eldonejo ktp.

En la kursojn publikajn venadu ankaŭ sportaj samideanoj kaj montru al komenculoj interesaĵojn el la mondo, kantigu ilin kaj instruu al ili ludi Esperantajn ludojn.

La samon praktiku ankaŭ en la junulara grupo mem. Firmigu vian kolektivon, ĉar tio estas baza premiso por sukcesa laboro. Aranĝu komunajn entreprenojn: ekz. ekskurson, viziton de la teatro, kinejo, ktp. Tiu ĉi kutimo estas kun sukcesoj praktikata en Praha, kie oni jam komune vizitis Křivoklát, Orlick, Průhonice, Zbraslav kaj aliajn lokojn.

Nova temo por nia laboro: KORESPONDU!

Interŝanĝu ne nur poŝtkartojn, sed petu de viaj korespondantoj kantojn kaj ludojn Esperantajn aŭ petu ian interesaĵon pri kiu vi raportos en la grupo.

Nova sugesto: Legu, legu, legu!

Pruntu Esperantajn librojn. Se vi ne scias de kiu do demandu en najbara Junularo. Legu atente nian junularan cirkuleron Tagiĝo, kiu vere meritas vian atenton! Petu ankaŭ Heroldon de Esperanto, kiu estas nun jam pli facile akirebla de s-ano Ginz en Praha.

Organizu vesperetojn por viaj anoj, kie vi amuziĝos, ion belan vi tralegos kaj eĉ donacos!

Ĉiujn ĉi sugestojn ni povas resumi en devizon: - „Ni vivu, ni agu“!

Ni estas ja junaj, do lasu manifestiĝi niajn junajn fortojn. En nia laboro ne estu personaj interesoj, sed pura solvo de grandaj ideoj, kiuj estas enhavo de nia movado.

Ni ĉiam vigle respondu ĉiun alvokon, ĉiun entreprenon – simple ni mem kreu nian movadon. Ni ne atendu instigojn, sed el propra iniciato proponu kaj agu.

Nia laboro baldaŭ ricevos novan kadron. Kadron internacian! Ni ĉiuj sentas malstreĉiĝon de la situacio kaj sekve de tio ni povas antaŭvidi aplikon de Esperanto en skalo de la tutmondo.

Jes, mi admiras laboron de la ĉeĥoslovaka junularo, kiu dum tiom multaj jaroj kuraĝis verve labori, kvankam ne vidis antaŭ si internacian uzeblecon de Esperanto, kiu devis, estante limigita de ŝtataj limoj, vivi nur el sia interna flamo. Kaj, karaj geamikoj, se ni en tiaj cirkonstancoj sukcesis ne nur vegeti, sed akiri brilajn sukcesojn, tio supozigas, ke nia laboro en cirkonstancoj pli bonaj, kiuj sur horizontoj jam reliefiĝas, atingos sukcesojn de pli bonajn.

Por nia nova laboro ni vokas: “Antaŭen nia brava junularo!”

VI. Novobilský

Post tiu referato komencis plua diskuto pritraktanta la agadon de la grupoj ne menciitaj en la du referatoj, diskutoj pri la preparo de Junulara Somera tendaro 1956, pri la organizaj aferoj, pri sukcese finita semajna seminario en Ostrava, pri plua eldonado de Tagiĝo ks.s.

La regiona kunveno Junulara estis vere sukcesa. Partoprenis ĝin 80 gesamideanoj el multaj lokoj eĉ tre malproksimaj (Karlovy Vary, Plzeň, Praha ktp.).

La kunveno donis novan entuziasmon al nia junularo por daŭrigi pluan viglan laboron en siaj lokoj.

Por kompletigi la informojn pri la ceteraj aranĝoj ĉu okaze de reg. Junulara kunveno en Ostrava, estas necese aldoni, ke sabate vespere estis aranĝita la kultur-amuza vespereto, kie la programon preparis Junularo el Ostrava kaj kontribuis al ĝi ankaŭ anoj el Junularoj: Opava, Praha, Brno, Olomouc. La ĉeesto de samideanoj el multaj lokoj estis vere tre impona. Nova pruvo, ke nia verda rondo familia ĉiam ŝatas tiajn entreprenojn kaj por sia vizito montras nian nombrecon.

Dimanĉe, post la junulara kunveno, estis kunvokita regiona laborkunveno de ceteraj esperantistoj. Multaj anoj de junularaj grupoj ankaŭ ĝin ĉeestis.

Por ĉiuj aranĝoj dankon al Ostrava Junularo kaj ceteraj samideanoj!

## VABU NOVAJN TAGIĜO-ABONANTOJN!

### **Tagiĝo 27 EKBRILIS**

-----ĉu pluraj numeroj ankaŭ meritos laŭdon?

Nur kelkaj tagoj pasis post la ekspedo de lasta numero de Tagiĝo kaj al ĝia adreso komencis preskaŭ pluvi la leteroj esprimantaj la kontenton kun ĝia ekipo, aranĝo kaj enhavo. Nin tio tre ĝojis, ĉar ni konvinkiĝis, ke Tagiĝo estas legata kaj ke niaj legantoj amas ĝin. Tio donis al ni kuraĝon en la pluan laboron.

Sed ricevinte tiun ĉi numeron, vi certe demandas, kial ne konservis Tagiĝo sian belan preson kaj ekipon, kia ĝi estis en la 27-a? Ĉu la laŭdoj senditaj tion kaŭzis? - Kredu ke ne! - Ĉu vi komprenas kiom da zorgoj kaj laboro ni devis venki, ol ni povis eldoni la lastan numeron? Kaj krom tio kiel multekosta estis la lasta eldono. Nur prenu krajonon kaj kalkulu! Ni dissendas ĉiun numeron al preskaŭ 220 personoj en nia lando kaj ankaŭ fremdlande. El tio pagis la kotizon preskaŭ 120 homoj, kaj por la jarabono ni tiel gajnis Kčs 1.100,-, ĉu vi konas la prezon de papero, de farboj, de afranko, de stenciloj ktp, ktp, kaj la propran laboron ni tute ne kalkulas. Nun respondu, kiom da numeroj ni povus eldoni, se nur la lasta numero, nur la preso kostis Kčs 650,-? Vere, eĉ ne du numeroj estus plene kovritaj. -

Jen la plej grava obstaklo ekzistas, kiu malpermesas pluan eldonon en tiaj cirkonstancoj. Vere mono ludas denove ĉi tie sian plej gravan relon. Kompreneble ekzistas multaj aliaj gravaj malfacilaĵoj. Ĉiu leganto devus konscii tiujn ĉi ĉiujn malfacilaĵojn, kiuj aperas ĉe ĉiu eldono de kia ajn gazeto, revuo aŭ cirkulero, kaj tial ni amu niajn presaĵojn, ili ja estas por vi, ili estas perantoj de informoj, instruoj kaj amuzo.

Do eĉ se ĝi estos malgranda, ne tro belaspekta, sed ĝi estas la nan! kaj ĝi helpas al ni!

Kaj jen ni alportas kelkajn fragmentojn el la leteroj de niaj legantoj.

...vi bele surprizis nin por la lasta numero de "Tagiĝo". Ankaŭ en aliaj lokoj ĝi forte impresis ...

...kun objektiva ĝuo ni tralegis la lastan, 27an numeron de via Junulara organo Tagiĝo. Ĝi ravis min kaj per valora enhavo kaj per la belgusta lertega aranĝo kaj ekstera aspekto. Tagiĝo sendispute estas la plej bona kaj impona ĉeĥoslovaka esperantista gazeto. Do nia gratulo estas elkore sincera. La aktiveco de niaj junularanoj estas instiga por ni aliaj. Estas neceso, ke la junaj ekamu vere sian plaĉan gazeton, legu ĝin ĝis lasta litero, kaj plie, kunlaboru aktive kun sia gazeto. Estas ĝojinde, ke en tiel ampleksa dekpaĝa denslinia gazoto apenaŭ troveblas kritikeblaĵoj. Post atenta tralego ni trovis tro nalmultajn preserarojn... /Jiří Kořínek/

...ni estis tre surprizita, kiam mi vidis la lastan numero de Tagiĝo. Ĝi estis belega! Mi vere hontas, ke ni ĝis nun ne abonis ĝin...

...Kiamaniere mi diru tion plej ĝuste: - simple - pli ol eksplodo de atombombo efikis je mi hodiaŭa koverto, kiu alportis al ni tian juvelon...

...ĉi numero ege plaĉis al mi. En ĝi estas tre interesajlegaĵoj kiel por enlandaj tiel ankaŭ por eksterlandaj esperantistoj. Mi deziras esti regula aboninto de ĉi cirkulero ankaŭ estonte ... /B.A.Valev, Bulgario/

... hodiaŭ mi ricevis vian belegan bultenon, ĝi estas io, por kio ni ne bezonas honti, ni gratulas al vi ...

...hieraŭ ni vere ĝisvivis grandan surprizecon, kiun vi preparis pere de ĵus aperinta "Tagiĝo". Ĝi estis kvazaŭ neatendata bombo. Mi ĝojas kun vi el tiu sukceso kaj ni kore gratulas al vi...

... via lasta nro 17 de Tagiĝo tre surprizis min! Mi gratulas al vi pri viaj progresoj. Estas vere mirinde, ke en la nuna tempo, kiam oni devas rezigni je kelkaj plezuroj, vojaĝoj, mendoj de libroj ktp, la junularo tamen ne perdas paciencon ... junularo ne forgesu ke en ilia mano estas la estonteco.. junularo havas de sufiĉe da idealaj celoj kiel reformigi la mondon estontan. Daŭrigu do vian laboron per Esperanto – vi mem rikoltos feliĉon... /S.Čipera - Aŭstrio/

...intereshava kiel ĉiam, belaspekta kiel neniam ĝis nun, la cirkulero "Tagiĝo" fariĝas inda reprezentilo de la merita laboro de la E-junularo. Ĉiu linio elspiras junecan vervon kaj tiu ligita kun serioza laboro certe rezultigos riĉan rikolton. Akceptu mian varman gratulon kaj deziron de sukcesego en via laboro... /Zmeškal/

...akceptu mian sinceran dankon por plej nova kaj bele vestita numero de Tagiĝo. Mi gratulas al vi por viaj sukcesoj...

...elkoran dankon por la senditaj numeroj do Tagiĝo. Via "Tagiĝo" estas vere bona gazeto kaj estus granda domaĝo, se ĝi ĉesus aperi. Sen ĝi estus nia junulara movado tia kia homo sen la mano ...

...per la 27-a n-ro de la "Tagiĝo" ĉiuj abonantoj certo estis agrable surprizitaj - pro la abunda enhavo, pli bona ekipoj, kantaĵo de Th. Kilian, enmetita varbfolio ktp ..

...dankon pro la alsendo de Tagiĝo. Kun plezuro ni lernas la kanton: "en la junulara rond" aperinta en Tagiĝo... /Christine Bärner-DDR/

...kiel vi scias, mi abonpagis anraŭ ne longe la bonegan cirkuleron "Tagiĝo". Kiam mi tion faris, mi mi konfidis nur la aŭskultitan entuziasman kritikon. Kaj vere mi trovas ĝin prava. La Tagiĝo estas ne nur gazeto ege interesa, sed samtempe ankaŭ rare instrua. La tradukteksto en la 27-a numero kiun mi hazarde ricevis /prunte/ havas aldonon: "Mládeži, a teď do práce!!!" /Junularo, kaj nun ek al laboro!/ Kun mi staras ĉi tie deprimita kaj peze embarasita: Mi sendis la abonpagon, mi ellaboris la tradukon, kaj nun mi vidas, ke mi apenaŭ povas sendi mian tradukon eĉ malgraŭ tio, ke vi atendas "ty ostatní, kteří určitě přijdou bez vybízení" /tiujn ceterajn, kiuj certe venos sen adnomo/, ĉar mi estas, kvankam esperantisto ne malnova, tamen terure maljuna! Mi nun petas vin, ĉu mi - aboninte cirkuleron junularan – tiamaniere iĝis almenaŭ ia "kvazaŭjunulo" aŭ "junulo k.s." - por ke antaŭ mi povu elsendi mian kontribuajon...

Red.



Ni prezentas al nia legantaro tradukon de la poemo "Svlaček" de Jaroslav Seifert el la poemkolekto: "Šel malíř chudě do světa."

## KONVOLVULO

Tradukis: Jaroslav Mráz

Ĝi super vojfosajo pendas,  
volviĝas sur sekala tig'.  
Al vi por trinki ĝi etendas  
nur rosan guton en kalik'.

Facile la pasanto iras,  
lin kvazaŭ ebriigus vin'.  
Al knabo ŝajnas, ke ekspiras  
al li odoro la patrin'.

## Korespondanoncoj:

25-jara librotenisto, fotoamatoro, interŝanĝas bildkartojn kaj deziras korespondi, same kiel aliaj junaj kursanoj de Julio Baghy, kun ĉs. gejunuloj.

Adr.: Kálnay Attila, Budapest XI, Fohérvári út 38, Hungario.

Mezlerneja instruisto de latina kaj germana lingvoj dez. korespondi kun ĉs. geesperantistoj.

Adr.: Edw. Dombiski, ul. Bolojannisa 7/2, Stargard Izcz., Polska.

---

*Ĉu ankaŭ vi partoprenas  
JUNULARAN konkurson?*

---

## NOVAĴOJ

---

..... en la Esperanto movado.

### Prof. Canko Murgin el Sofio en ĈSR

K-do prof. Canko Mungin, asistanto de Supera Ekonomia Instituto de K. Marx en Sofio, prezidanto de Esp. socicto en Sofio, estrarano de BEA, venis 1.11.55 en Ĉeĥoslovakion por vojaĝi tie ĝis 29.11.1955. Krom esperantistaj rondetoj li vizitis geografiajn instituciojn. Lia vojaĝprogramo estas: Plzeň, Praha /4.-10.11/, Pardubice, Hradec Králové, Kutná Hora, Brno, Olomouc, Ostrava, Opava, Gottwaldov, Martin, Bratislava. Li alportis al ni varmajn salutojn de Junulara Fako de Bulgara E-Asocio. El bonveniga kunveno en Praha oni mendis salutojn al tiu ĉi fako kaj al E. Bokarev en Moskvo.

### "Verda Ĉaro en Bulgarion?"

En Sofio deko da esperantistoj fondis dum septembro Esperanto-estrandon „Flamo“. Ĝi sendis kontaktan leteron al "Verda Ĉaro de Julio Baghy" en Praha por interŝanĝo de spertoj kaj krome inviton ludi ĉe la bulgara Esp.-kongreso 1956.

### Ni aŭdis ...

ke Junulara Fakto de Bulgara Esperantista Asocio intencas inviti oficiala reprezentanton de la ĉs. Esperantista Junularo por partopreni la somerajn Esp. aranĝojn 1956 en Bulgario.

### Ŝustr 25-jarojn kluba prezidanto.

S-ano Jaroslav Ŝustr (Prahá I, Dlouhá 10) festas kvaronjarcentan jubileon de prezidanteco de Esperantista Klubo en Praha (fondita en j. 1902). Ni ĉiam konis lin kiel senlaca laboranton por Esperanto kaj por la amata klubo. Ni junaj sekvu lian brilan ekzemplon de laboro kaj fideleco al la afero! La Esperantista Junularo en ĈSR kaj la redakcio sincere gratulas al s-ano Ŝustr.

### Andreo Ĉe (Cseh) 60-jara.

Je la 12-a de septembro fariĝis sesdekjara la fama esperantisto Andreo Ĉe, eltrovinto de konata instrumentado kaj fondinto de Internacia Cseh-Instituto. Ne multaj el ni scias, ke liaj geavoj (Ĉeĥ) devenis el la ĉirkaŭaĵo de la moravia urbo Telč.

Pri la "Esperantista tendaro en ĈSR" raportis organo de UEA „Esperanto“ nro 10, legata en sepdeko da landoj. Ĝi diras i.a., ke niaj SET ne havas analogion en la Esperanta mondo.

### Nova vento por Esperanto inter ĉs. blinduloj.

La redakcia komitato de la ĉeĥa porblindula gazeto "ZORA" (kies esperantlingvan aldonon "Aŭroro" redaktas Vuk Echtner) decidis peti la Ježek-bibliotekon ke ĝi ellaboru liston de muziknotaj publikaĵoj, taŭgaj por oferto al eksterlandaj blindulaj bibliotekoj. La oferta flugfolio estas eldonita en Esperanto. La komitato decidis plue "en la senco de la reĝustigo de opinioj pri Esperanto" propagandi per "ZORA" Esperanton inter siaj legantoj. La Aŭroro publikigos de nun ankaŭ informojn pri la vivo de eksterlandaj blinduloj - esperantistoj. S-ano Echtner estis komisiita ellabori flugfolion kun oferto de la "Aŭroro" al blindaj esperantistoj en eksterlando. "Aŭroro" estas brajle presita porblindula Esperanto-organo, fondita en j. 1920 kaj estas do unu el la malnovaj Esperanto-gazetoj. Ĝia aperado estis interrompita dum la milito, sed de post j.1945 ĝi daŭre kaj regule aperas kaj sukcesis transvivi la periodon de malfavora sinteno kontraŭ Esperanto, kiam ĉiuj ceteraj Esperantogazetoj en Ĉeĥoslovakio ĉesis aperi. Nun aperas la 29-a jarkolekto de "Aŭroro".

*Ĉu konas lokaj delegitoj siajn devojn?!*

### Niaj legantoj skribas, kritikis, proponas ...

... estas bone atentigi pri kelkaj eraroj aperintaj en la lasta 27-a n-ro de Tagiĝo: ...estas vero, ke fuĝeco de iu objekto povas certe maltrankviligi ĝian posedanton, sed igas lin ekĝemi "ne estas tie ĉi" nur post sukcesinta fuĝo. Mi pensas, ke li ne intencis akcenti la econ, sed la efektivan faron, do fuĝon ... ankaŭ mi dum la lasta tempo ofte legis aŭ aŭdis, ke ĉe fino de iu entrepreno tiu aŭ tiu "valorigis" la laboron faritan. Ĉu vere iu alia povas igi = fari la laboron aŭ agon de iu valora? Ĝi estas pli-malpli valora per si mem, sed neniam iu alia povas ĝin valorigi. Estas ĉeĥismo, kiun eble komprenas niaj samlandanoj, sed certe ne eksterlandaj samideanoj. Nia vorto "zhodnotil" signifas, ke oni koncize skizas ĉion, kio estis farita, do resumas, aŭ se oni volas esprimi la valoron de la faritaĵo, do pritas, ankaŭ simple taksas aŭ aprezas ĝin ...

De Pál Nalkanyi Budapest 54.M, Nemzeti Bank, Hungario ni ricevis leteron el kiu ni citas:

... Leginte pri via bona laboro, junulara kunveno, eldono de Tagiĝo, ni kore salutas vin kaj esperas daŭran interrilaton kun nia junularo kiu nun fondis la rondeton en teksaĵfabriko! Bonvolu ankaŭ

sendi saluton al Mondfed. de Demokr. Junularo, Budapost VI, Bonczur, u.56, okaze ties dekjara festo kaj petu uzon de Esp. en siaj organoj kaj okazo de vononta Festivalo. Sciigu, se ia junulara aranĝo estos en Hungario, iu el via esp. junularo nepre dezirus ĉeesti, do ili obligu tion! Sendu por murgazetoj ian junularan salutleteron kun bildetoj, afiŝoj pri ĉeĥoslovaka junulara vivo! Ankaŭ priskribu vian junularan organizon esperantistan en via lando, ĉar oni povus uzi la spertojn en Hungario, kie nun kelkloke lernas junuloj, lernantoj Esperanton ankaŭ en kelkaj lernejoj kaj uzinoj. Nia kunlaboro plifortigu nian laboron por socialismo, paco!  
/Ni helpu al E-junularo en Hungario – rim.red./

El letero de Imre Ferenczy, Budapest IX., Ullői út. 119, Hungario ni citas jenon:  
...mi sciigas vin, ke TFDJ eldonis mallongan filmon pri la dekjara TFDJ por angla, germana kaj franclingva teksto. Se la esperantistaj organizoj petos, TFDJ epikos filnon ankaŭ per esperantlingva, teksto kaj ĝin senpage disdonon.

Bonvolu sciigi en la Tagiĝo, ke la hungaraj junuloj komencos interesiĝi pri Esperanto, ĉar en Esztergom-Tábor fondiĝis Junulara Esperanto-Rondo, en Budapest fondiĝis uzina junula Esp. rondo kaj la budapestan kunvenon vizitas ankaŭ junuloj. La junularan movadon gvidos s-ano Imre Ferenczy, kiu estas ano de la Hungarlanda Esperanto Konsulta Komitato. La hungara Esperantista Junularo kore salutas la ĉeĥoslovakon Esperantistan Junularon kaj deziras al ĝi multe da sukcesoj!

Artikolon de Imre Ferenczy pri la 10-jara festo de Mondjunulara Demokrata Federacio ni pro manko de loko en ĉi numero ne enmetas kaj ni publikigos ĝin en venonta numero.

Ni petas pardonon ankaŭ de ĉiuj legantoj, kiuj mendis kian ajn artikolon, ke pro tromulto da materialo kiu amasiĝis por tiu ĉi numero ni devas prokrasti la publikigon nur en la venonta numero.

Por ĉiuj pluaj kontribuoj ni dankas al vi kaj ni atendas ilin.

„Tagiĝo“

K o r e k t o j -----

En la raporto pri la historio "Esperanto kaj Poezio" de J.Kořínek en la n-ro 27, pĝ 7, forfalis grava vorto. Korektu ties komencon jene: "Tre va l o r a mallonga historio..."

En la raporto pri Varsovia festivalo estis uzitaj du diverasj nomoj por la Societo en USSR, kaj ambaŭ malkonformaj al la realo: Ĝuste estas: "Sovetunia Esp.-Societo".

Malĝusta estis la sciigo en Tagiĝo 27, ke sekcion de Studenta E-Movado gvidas s. Werner Jan. Por tiu celo estis elektita en Otrokovico s-ano J. Pastor, Pod Dělankou, vysokoškolské koleje, Praha, XV. S-ano Werner volas kunlabori en tiu afero kiel loka peranto de studentoj en Brno.

La. red.

## NI AŬDIS

...ke la patro do nia ŝatata samideano D-ro Jarimír Jermář estos solene nomata la 17-an de novembro, Akademiano. /la filo estas scienca laboranto de la Ĉs. akademio de Sciencoj en Praha, iama funkciulo de ĉs. juliulara movado esperantista kaj landa peranto de TEJO, komitatano de EAĈSR; kiel membro de ĉs. oficiala kultura delegacio al Varsovia junulara mondfestivalo li partoprenis la internacian esperantistan renkontiĝon kaj parolis tie en la nomo de la ĉs. esperantistaro. Per lia merito la Ĉs. akademio de Sciencoj ekkunlaboris kun la Jugoslavia Akademio. Kaj la kontakta letero estis skribita en ... Esperanto.)

...ke nia kultura delegito Vlasta Novobilský estis elektita en sciencan rondeteton en sia kemia fakultato.

...ke niaj konataj SET-anoj geedzoj Křenek en Praha – fariĝis vojaĝistoj: dum unu duonjaro ili transloĝiĝis jam trifoje.

...ke s-ano instruisto, Dolfa Bartošík en Praha, posedanta nederlandan edzinon, ricevis en Kopenhago la unuan premion en grafika konkurso pri afiŝoj.

...ke s-ano K.Fabián en Olomouc ankoraŭ ne respondis al s-ano Dolfa Bartošík, kiu per siaj proponoj partoprenis en julio 1954 konkurson pri insigno de ĉs. esperantista junularo.

...ke la Opero en Olomouc preparas surdiskigon de "Vendita Fianĉino" en Esperanto.

...ke la bulgara esperantista junularo estis surprizita, vidinte je la unua fojo nian "Tagiĝon" kaj sur ĝi numeron: "27".

...ke s-ano Vuk Echtner deziras atingi, ke reprezentantoj de almenaŭ kvar nacioj partoprenu nian SET-1956.

...ke nia "Van" gajnis la unuan premion en konkurso de "Juna Voĉo" pri orig. rakonto.

...ke Junularo en Praha kunvenas ĉiumonate kun D-ro Tomáš Pumpr por literatura diskuta kafkunsido.

...ke Vlasta Novobilský estis "kaptita ĉe la vorto" dum fanfaronado pri sia kuirarto kaj devis 13.11. (ho, tiu malbonaŭgura 13!) prepari ĉe Stáňa propramane dimanĉan tagmanĝon por sesnombra rondo samideana. Mankas ankoraŭ informo pri la rezulto: ni esperas, ke ĝi ne estis atenco kontraŭ nia Centrejo, ĉar en tiu okazo nia centrej-anaro estus en la nuna monato jam formortinta!

...ke la verko "Sinjoro Tadeo" de A. Mickiewicz estos presita. La mendojn direktu al: "Artia", Praha II, Ve Smečkách 30, Ĉiu esperantisto posedu tiun ĉi valoran libron!

...ke la lasta Tagiĝo 27 sur la paĝo 5 en artikolo: Letní Esperantský tábor na Vranovské přehradě – estis forgesite menciit inter la instruistoj ankaŭ s-anon Raška, kiu instruis en la unua etapo de la tendaro.

Jan

## TAGIĜO petas la legantojn

Al ĉi numero ni almetas la ĉekpagilon por reabono de nia bulteno junulara. En jaro 1956 estos eldonota Tagiĝo en periodo dumonata. Se ni gajnos almenaŭ 300 pagintajn abonantojn ni provos eldoni ĝin en ekipo kaj aranĝo de numero 27. La abonkotizo por j. 1956 estas Kĉs 12,-, nia ĉekkonto: STSP-Opava, čís. 8155 – Esperanto.

Komencu nun vastan propagandon de nia junulara organo. Antaŭpagu "Tagiĝon" por via fremdlanda korespondamiko!

La fremdlandajn samideanojn ricevantajn nian Tagiĝon, ni petas almenaŭ per poŝtkarto konfirmi, ke ili interesas ankaŭ venontjare ricevadi nian bultenon.

Por via efika helpo ni dankas

Via "TAGIĜO"

Pliajn abonantojn!

# RAPORTO EL KARLOVY VARY

Sur la stratoj de Praha lumas ankoraŭ lalternoj kaj densa nebulo kreas ĉirkaŭ la lumoj laktocirklojn. Estas mateno, la 25an de septembro 1955, kelkajn momentojn antaŭ la kvina horo. Al Jungmannova strato celas paŝoj de multaj ges-anoj en tiu ĉi frua horo. Atenta leganto de la Bulteno nun rememoras: jes, ekskurso al Karlovy Vary!

Kaj jen ekbruis malantaŭ domo motoro kaj alveturis nia "privata" aŭtobuso, kies famo disvastigis inter esperantistoj el Praha precipe post la aventuroplena vojaĝo al Otrokovice.

Ĉiu trovis sian loketon kaj longdaŭra vojaĝo al Karlovy Vary komenciĝis. Dum regis ankoraŭ nokto kelkaj el ni provis eĉ dormeti, - sed postkiam aperis la suno, la humoro subite viviĝis. La junularo kantas, amuziĝas kaj legas unu post la alia nove aperintan numeron de Tagiĝo. La bona amuzo kaj ĉarma naturo laŭvoje kaŭzis, ke ni tute ne rimarkis rapidan pason de horoj. Tabuloj, kun indiko de kilometroj, atentigas nin, ke restas nur 30,20,15 kaj fine 1 km al la celo de nia vojaĝo! Kaj jam ni glitas sur serpentumvojo kaj belega panoramo de Karlovy Vary konturiĝas antaŭ ni. Unuaj domoj de la urbo.. subite ekhaltis la aŭtobuso kaj du junaj esperantistoj suriris nian "ferdekon": salutoj ridetoj, manpremoj!

Post kelkaj minutoj ni descendas el la aŭtobuso sur malgranda placo. Areto da geesperantistoj el K.V. nin atendas: novaj salutoj, novaj manpremoj. Sed jen dro Vaněk prenas vorton kaj salutas nin ĉiujn en la fama banloko, esprimante sian konvinkon, ke ni ĉiuj bone profitos komunan kunreston. Kiam juna esperantisto transdonis al s-anino Šustrová belan bukedon – ni ĝoje ekaplaŭdis vekante surprizon ĉe la preterpasantoj.

Antaŭ ĝenerala trarigardo la urbo ni bonege matenmanĝas. Ni vizitas poste unu el urbaj bandomoj kaj konatiĝas kun ĝia skipo, kiu servas al resanigo de multegaj pacientoj, venantaj el plej diversaj landoj. Ni vizitas Jelení Skok, elrigardan turon kaj poste promenas tra la urbo, gustumante la akvon el multaj akvofontoj. Dume ni bone amuziĝas. Se oni aŭdas gajan Esperantan interparolon, oni povas aserti, ke tie estas ges-anoj el Most, kiuj surprizas per sia flua Esperanto.

La promeno kaj babilado nin fine malsatigas kaj ni kun granda apetito manĝas bonegan tagmanĝon. Ni trinkas ankoraŭ kafon, kiam komenciĝas mallonga konferenco. S-ano Šustr el Praha anoncas, ke la entreprenon partoprenas entute 56 personoj el 10 lokoj. Li salutas la kunsidon. Lia parolado estis alternita por tiu de s-ano Echtner, kiu dankas al oferemaj ges-anoj el K.V., kiuj modele organizis la entreprenon kaj akcentas ĉefan celon de nia vizito: fondon de la Junulara grupo en K.V. Kaj vere. Post ĉi tiu kunsido ni veturas per aŭtobuso el Břežany, kie la junularo grupiĝas en ĝardeno ĉirkaŭ la tabloj kaj malfermas mian kunvenon. Oni esploras la situacion en K.V. kaj trovas konvena por fondi novan junularan grupon ĉi tie. S-anino Věra Škvrňová kaj geedzoj Horákovi zorgos pri unuaj paŝoj de la grupo.

Venas s-ano dro Vaněk inter nin, kaj ĉarmas nin per kelkaj poemoj trasantite deklamitaj. Li kaj dro Pumpr aranĝas malgrandan literaturan lecionon, kiu certe apartenis al la plej belaj programeroj el 1a ekskurso.

Sed krepuskiĝas. Ges-anoj el Most kaj Plzeň adiaŭas nin kaj foriras al stacidomo. Ankaŭ ni, prahanoj, adiaŭe dankas niajn geamikojn el K.V., kiuj tiom majstre sciis variigi nian programon.

Tra mallumo veturas nia aŭtobuso. Sed neniu estas el ni laca – almenaŭ el ni junaj! Gitaro kaj kantoj gaje sonas, alternataj per rakontado de gajespritaj anekdotoj (kie ekbrilis humoro de dro Pumpr). Kiam aperis lumoj de la ĉefurbo multaj el ni asertis, ke hodiaŭa ekskurso estis la plej bela dum lastaj jaroj. Kaj ni ankoraŭfoje dankis al tiuj, kiesmerite la entrepreno efektiviĝis – al s-ano Vuk Echtner, kiu organizis kaj gvidis la ekskurson kaj al ges-anoj el Karlovy Vary, kies merito estas, ke la ekkurso tiel bone sukcesis.

Ni salutas vin, karaj geamikoj, en Karlovy Vary, kaj deziras al vi – BONAN VENTON POR VIAJ VERDAJ VELOJ -

Van

---

*RD devas esti garantio de la agado!*

# PAROLAS JULIO BAGHY

Nelonge post mia reveno el la IV. Somera Esperanto Tendaro 1955 mi sendis en la nomo de la tuta Esperanto-Junularo en ĈSR al nia famekonata poeto, Julio Baghy, salutleteron, esprimante tiamaniere profundan dankon kaj senton de estimo al li kaj lia verkaro. Dum tri semajnoj venis la respondo, kaj ni ĝin tutan represas.

Vlas. Novobilský

Julio Baghy  
VII. Rottenbiller u. 66.  
BUDAPEST Hungario

Budapest, 15.IX.1955

Estimata samideano, kara juna amiko,

pli granda honoro ne povas esti por poeto, kies koron jamŝarĝas travivaĵoj de longaj jardekoj ol komprena entuziasmo de la junularo pri liaj verkoj. Via afabla letero alportis honoran saluton al mi de vi kaj de la ĉeĥoslovaka junularo esperantista. Kvazaŭ ĝi frapetus ĉe mia koro sugestante la penson „ni scivolos pri vi“. Nu, rigardu, mia koro, kiel ankaŭ la via, estas plena de amo, por kiu mi ofte dezirus ĉirkaŭpreni la parencajn korojn, batalantajn por ideoj kaj idealoj, kiuj celas servi la HOMON sur vojo de la progreso. Ankaŭ mia koro, kiel la via, estas plena de nepra konvinkiteco, ke mi batalis, laboras por nobla afero, kies triumfo signifos utilon al la homaro. Ankaŭ mia koro, kiel ĝuste la via, sentas, ke trans landaj lingvolimoj ĉie troviĝas gefratoj, inspiritaj de la homa solidareco, kiuj volonte dediĉas tempon, energion por helpi en la kreado de la vera paco kaj universala nova kulturo. Malgraŭ griziĝintaj haroj, zorgosulkaj, fizika aĝiĝo, vidu, nia koro venkis la tempon kaj ĝi ne perdis sian junecon. Kial? Nenion koro maljuniĝas, se ĝi nutras sin el fonto de noblacelaj revoj! Seniluziigoj, plagoj, premaj cirkonstancoj, teruraj militoj povas mueli la korpon, nervojn, ŝanĝi la spekon, sed se la koro nutras sin el tiu neniam elsekiĝanta fonto de noblacelaj revoj, ĝi konservas sian internan junecon ĝis lasta spiro. Tial mi sentas min laŭ mia koro “honora membro” de la ĉiama junularo kaj tiu mondonacita membreco rajtigas min partopreni ĝoje en ties revoriĉa laboro, eĉ se ne aktive, almenaŭ aprobo, konsento.


Tre ĝojigis min viaj sciigoj pri la sukcesoj, kiujn vi, la ĉeĥoslovaka junularo esperantista atingis dum la lastaj adresoj. La sankta spito, pulsanta en la junularo, refoje pruvis kaj pruvos ankaŭ en la estonteco, ke neglektante barojn, nefavorajn cirkonstancojn, havas aktivan povon por daŭrigi tion, kion bone faris la gepatroj kaj konstrui plu tion, kion la nuntempa junularo konsideras utila por la postaĝa generacio. Tiel estas ĝuste, tiel estas juste!

En via letero estas distinge interesaj sciigoj pri aranĝoj dum la Somera Esperanto-Tendaro. Precipe plaĉas al mi, ke vi dediĉis parton de ĝi por popularigo de la literaturo, kiu per si mem, simile al ceteraj literaturoj nacilingvaj, prezentas ion specialan, ion proprecan. Ju pli oni atentos kaj zorgos pri la graveco de nia literaturo, des pli emfaze reliefiĝos ĝiaj signifo kaj utilo en la eduko de la novaj adeptoj de nia lingvo. La literaturo instruas nin ne nur pri esprimriĉa parolo, sed ĝia granda akiras konsiderindan prestiĝon al nia lingvo en internaciaj rilatoj.

Mi deziras brilan prosperon al la ĉeĥoslovaka junularo esperantista kaj esperas, ke ĝia ekzemplo estu sekvata de alilandaj junularoj, ĉar la kunigitaj fortoj plirezultige povos akceli la komunajn interesojn en harmonia kunlaboro por la paco, por la reciproka estimo inter popoloj.

Okaze interpretu mian koran simpatian, samideanan saluton al viaj gekolegoj, al la tuta junulara movado esperantista en ĈSR. Dankon por la senditaj foroj kaj por la tre plaĉa melodio de poemo, muzikigita de Radim Kudla.

Akceptu korajn bondezirojn, amikan manpremon  
de via



## ----- JUNULARO KONKURSEMA -----

Ni revenu ankoraŭ al la konkurso publikigita en pasinta numero de Tagiĝo. La intereso, kiun montris niaj grupoj pri la konkurso tre agrable surprizis nin. Granda leter-serio kun tradukoj kuŝas antaŭ ni sur la tablo. Ĝin komencis s-ano Mirek Kulíšek el Plzeň kaj finis s-ano Vlasta Kočvara, kiu ankoraŭ per ekspresletero penis enviciĝi en la konkurson.

Efektive, bela rikolto, ĉar 48 kontribuantojn ni ankoraŭ neniam ricevis.

Dekomence estis klare al mi, ke kontraŭ-militaj taskoj estas malpli facilaj kaj sekve de tio, ke ili estos malpli multaj. Sed kia estis mia ĝojo, ricevinte 12 verkojn pri tiu ĉi temo, plejparte profunde trasantitaj kun interesaj originalaj pensoj. Eĉ du poemoj troviĝis inter ili (s-ano Chrápavý kaj Hořejší). Verkoj de s-anoj Werner, Lorková, Matušková, Kremláček kaj Kulíšek estas bonegaj kaj represindaj!

Laŭdinda estas diligenteco de junaj ges-anoj, kiuj sendis ambaŭ taskojn: Zýka, Šťastný, Kulíšek, Plachý, Hořejší (Plzeň), Kočvara, Matušková (Opava), Lorková, Werner (Brno).

Tradukojn el la ĉeĥa lingvo krome sendis ges-anoj:

Neoral, Zýková, Březina, Uhlík, Novotná, Caklová, Novotný, Mráz, Škvrna, Veselá, Krouský, Kudla, Mlynář, Tichý, Ešpandr, Bařinka, Curylová, Pěchová, Hršel, Cink, Bachtíková, Kaláb, Rybová, Vaňková, Borkovcová, Valjan, Wernerová.

Mi dankas, karaj geamikoj, al ĉiuj, kiuj partoprenis nian unuan konkurson kaj samtempe petas pardonon, ke ni ne povis al ĉiu aparte respondi la leteron!

Sed nun ni devas taksu la konkurson ĝenerale:

Nian gratulon akceptu Junularo en Plzeň, kiu gajnis unuan premion (12 taskoj) antaŭ Junularo en Brno (11 taskoj). Trian lokon gajnis grupo en Praha (7) antaŭ Junularo de en Ostrava kaj Opava (po 5). Sekvas grupo en Most (3), Žďár nad Sáz. (2), Svitavy, Hradec Králové, Lanškroun kaj Strašice (po 1).

Evidentiĝis, ke la membro-nombro ne estas ĉiam la sola premiso de la sukceso: la grupo en Plzeň ja havas malpli grandan nombron de anoj ol ekz. Praha. Efektive venkas „volo venki“!!

Tiu ĉi konkurso estas fermita. Ni aperigas 2-an konkurson, kiun partopreni povas ĉiu grupo aŭ opulo sen timo, ke lia nepartopreno en la unua iamaniere influos lian pritakson.

Mi petas de vi, karaj gelegantoj, respondon de la jena demando: ĉu ni anoncu ankaŭ nomojn de unuopuloj, kiuj venkis en konkursoj, aŭ ni nomu nur grupojn?

Se ni tamen hodiaŭ volus elekti kelkajn nomojn, mi tion ne povus fari sen embaraso, ĉar ĉiuj kontribuantoj estis tre bonaj. El la originalaj verkoj kontraŭ-militaj mi pleje aprezas verkojn de jenajn s-anojn: Werner, Matušková, Lorková, Kremláček. El la tradukoj: Mráz, Cink, Hršel, Veselá.

Timemon montris Junularo en Přerov kaj Pardubice, kiu tute ne respondis la alvokon de Praha kaj Opava. Verŝajne ili preparas surprizon por ni en ĉi tiu Tagiĝo!

Sed nia konkurso ne plenumus sian celon, se vi ne povus korekti viajn erarojn laŭ modela traduko. Mi ofte aŭdis tre interesajn diskutojn pri „napařil“, „mastný“ kpt. La traduko de dro T. Pumpr, kiu afable plenumis mian peton, klarigas ĉiujn dubojn:

“Estis interkonsentite, ke Sirka iros sola, kaj Valnoha kun Zrzek lin akompanos al Kopanina, parte por ke al li la vojaĝo pasu pli agrable, parte por ke ili estu en proksimo, se li bezonus ilian helpon. Do tiel estis interkonsentite. Tamen devus ne ekzisti sur la mondo la profesoroj, la paĉjoj kaj similaj obstakloj, kiujn la naturo metas en la vojon al la justa plenumiĝo de la bubaj planoj. Kontraŭ Valnoha konspiris la profesoro de matematiko kaj la paĉjo. La profesoro de matematiko staplis al la klaso sur la dorson lecionon je du paĝoj kaj kredu, grandajn taskojn, por kies solvo oni estu almenaŭ Tycho de Brahe aŭ Archimedes. Valnoha diris al si, ke li skribos la lecionon nur post la vespermanĝo, aŭ ke li antaŭ la instruado laŭskribos ĝin rapide de iu. Sed paĉjo de Valnoha estis en scivolema humoro, kaj kiam Valnoha volis post la tagmanĝo elŝteliĝi el la domo, li estis implikita en kruc-demandadon, kiu finiĝis per saĝa sed malagrabra aforismo: - Unue la devo, kaj poste la amuzo. -”

Vi certe konstatis, ke viaj tradukoj krom kelkaj eraretoj estiis tute bonaj!  
Kuraĝe do al

## II. Konkurso

kiu estas tre facila por vi. Via tasko estas traduki fragmenton el la fama libro de norvego Thor Heyerdahl: Ekspedicio Kon-Tiki, en la ĉeĥan lingvon.

La libro interese priskribas vojaĝon de 6 viroj trans Pacifikan oceanon per floso, kiuj tiamaniere volis pruvi, ke loĝantaro de Polinezio venis per similaj flosoj el Suda Ameriko. 101 tagojn ili drivas sur senlima oceano batalante kontraŭ ondoj kaj ŝtormoj. Ilian aventurplenan vojaĝon per spirretena maniero priskribas la libro "Ekspedicio Kon-Tiki". Vi povas legi ĝin Esperante aŭ en slovaka lingvo, en kiu ĝi ĵus estis tradukita el Esperanta lingvo. Jen la teksto:

La lasta stadio de nia kunesto kun la ŝarkoj estis, ke ni komencis tiri iliajn vostonojn. Oni diras, ke estas malnobla sporto tiri la voston de besto, sed tion oni diras, ĉar oni ne provis tiri ŝarkovoston. Tio estis vere refreŝiga sporto.

Por povi kapti la voston de la ŝarko ni devis antaŭe doni al ĝi frandaĵon. Ĝi volonte suprenigis la kapon alte super la akvon por ricevi ĝin. Ordinare ĝi ricevis la aranĝojn pendantan en ŝnuro, ĉar se oni nur unufoje donis manĝaĵon al ŝarko per la mano, tio ne plu ŝajnas amuza. Se oni donas manĝaĵon al hundoj aŭ malsovaĝaj ursoj per la mano, ili mordas la viandpecon, ŝiras kaj tiras ĝin, ĝis ili ricevas parton aŭ la tutan pecon. Sed se onitenas grandan korifenon je sekura distanco de la ŝarkokapo, la ŝarko alvenas kaj fermas la-buŝegon, kaj sen sento de movo la duona fiŝo subite estas for, kaj oni mem sidas kun la vosto en la manoj. Estis al ni granda peno per tranĉilo partigi korifenon, sed dum parteto de sekundo la ŝarko nerimarkeble tranĉis spinon kaj ĉion kiel viandeja tranĉmaŝino, per rapida flankenmovo de la triangulaj dentoj. Kiam la ŝarko trankvile turniĝis por ree profundiĝi, la vosto flirtis en la akvosurfaco kaj estis facile kaptebla. La ŝarkhaŭto estis kiel bona sablopapero, kaj apud la supra vostopinto estis kaveto kiu estis bona tenilo. Se ni bone tenis ĝin tie, ne estis la plej eta ŝanco ke ni perdos ĝin. Poste ni devis ektiri, antaŭ ol la ŝarko komprenis la situacion, kaj treni kiel eble plej multe de la vosto sur la trunkojn. Dum unu sekundo aŭ du la ŝarko nenion komprenis, poste ĝi komencis senefike balanci la antaŭkorpon, ĉar sen helpo de la vosto la ŝarko ne povas iri antaŭen. La ceteraj naĝiloj servas nur por ekvilibro kaj direktado. Post kelkaj senesperaj movetoj, dum kiuj ni devis firme teni ĝin, la surprizita ŝarko tute senkuraĝiĝis kaj inertigiĝis, kaj kiam la malfirma stomako komencis fali malsupren al la kapo, la ŝarko fine paralizigiĝis. Kiam ĝi kvietiĝis kaj pendis kvazaŭ rigida kaj atendanta, estis tempo tiri per la tuta forto. Ni ordinare sukcesis nur duone eltiri la pezan fiŝon el la akvo, sed tiam la ŝarko vekigiĝis kaj faris mem la ceteron. Per fortaj movoj ĝi mem ĵetis la kapon sur la trunkojn, kaj tiam ni devis plenforte ektiri kaj forsalti tre rapide, se ni volis savi la piedojn. Ĉar nun la ŝarko ne estis amika. En fortaj ĉirkaŭĵetoj ĝi kvazaŭ per martelego bategis la mabuvandon per la vorto. Ĝi ne plu ŝparis siajn ursmuskolojn. La granda buŝego plene malfermiĝis kaj la dentovicoj kaptis en la aero por ĉio kaj ĉiuj. Foje la militdanco finiĝis tiel ke la ŝarko okaze reirtis en la maron, kie ĝi por ĉiam malaperis post la hontiga humiligo.

-----

Dua parto de la konkurso postulas denove originalajn poemojn. Provu vian fantazion kaj el sekvantaj vortoj konstruu artikoleton, novelon aŭ poemon kun kia ajn enhavo. Nur ĉiuj menciitaj vortoj devas troviĝi en ĝi.

Jen la vortoj: - Ambasadoro, balono, indiĝeno, Tahiti, neĝo, meningito, ĝirafo, aŭtomobilo, lago, vaporŝipo.

- Nun prenu la plumon kaj skribu. Ni esperas ke ankaŭ niaj fremdlandaj legantoj de Tagiĝo partoprenos tiun ĉi parton de la konkurso. Mi deziras al vi agrablan amuzon! Ĉion sendu al adreso: Vlast. Novobilský, Praha 3, Újezd 11.

REKOMENDU LA KONKURSON INTER VIAJ GEAMIKOJ



## Nia ŝipano rakontas.

Estis fino de printempo kaj komenco de somero. Tiutempe alveturis en la havenon Ŝtettino nia mara ŝipo Julius Fučík kaj post ne longe ankaŭ ka nia kun karbo. Ĉar ni jam longe havis nenian okazon veni inter la homojn, ni tuj post ankriĝo iris urbon, kiu ĉiam havas ian plezuron por ĝojigi la lacajn ŝipanojn.

Ĉio ĉie verdiĝis. En mezo de la urbo troviĝis kelkaj malgrandaj herbejoj por ĉarmigi la grandurbon, sed la preterpasantoj, volante havi la vojon pli mallongan paŝis tra ili kaj tial formiĝis ĉie vojetoj, kiuj difektigis la tutan herban areon. La urbestro interkonsilis kaj tuj estis troveblaj sur la herbejoj ĉe la vojetoj surskriboj: "La trauro nur por azenoj."

Kompreneble neniu volis aparteni al la azenaro, do ĉiu iris survoje kaj la herbejoj denove ekverdiĝis.

Posttagmeze ni revenis ŝipen, ĉar ni eksciis, ke ni baldaŭ elŝarĝos la karbon kaj vere, ne longe post nia alveno alveturis du danaj motoraj marŝipoj, kies nomoj surprizis min. Unu estis "Via", la dua "Volo".

El parolo de ŝipanoj ni eksciis, ke verŝajne la posedanto de ĉi tiuj ŝipoj estas esperantisto, ĉar li baptis siajn ŝipojn per tiuj "strangaj nomoj".

Komencis elŝarĝado, sed la maŝino tre fajfis kaj knaris kaj ĝia estro agnoskis, ke ĝi devas rapide esti oleumita. Mi rigardis kiamaniere li rapide oleumos ĝin, ĉar tio estis laboro por pli longa tempo. La maŝinisto subite subakvigis ĝin en la havenan koton, eltiris post ne longe ĝin kaj la maŝino estis tiel rapide oleumita. Vidante mian miregan rigardon, li ekridis kaj diris: "Jen mia metodo, kiamaniere ŝpari la grason kaj oleon kaj tiel gajni pli multe da mono."

La karbo baldaŭ estis elŝarĝita, nia ŝipo malplena kaj ni veturos al novaj aventuroj.

Sek

## La Nikolaa vespereto.

Post la Interbabilado en Ostrava anoncis nia "kalendaro de Esperantaj entreprenoj" aranĝon de Nikolaa vespereto en Praha, kiu okazis sabate la 26-an de Novembro.

Laŭ la raportoj programo konsistis el du partoj: En la unua partoprenis tiuj ĉi artistoj:

Clara di Giuseppe Minarini /Italio/	-	soprano
Jarmila Kletečková		soprano
JUDr. Pravoslav Sádlo		violoncello
Jiří Knobloch		baritono
Pavel Kvapil		piano

Ilia programo estis pliriĉigita per gajaj scenetoj. Tiu ĉi programo estis finita per la disdono de donacetoj kiujn alportis la ĉeestintoj por siaj konatoj.

Poste ekkomencis la dancamuzo, kie muzikis la orkestro de entreprena klubo Strojexport kaj daŭris ĝis la fino de vespereto.

Dimanĉe la 27-an de novembro estis organizita Regiona Junulara konferenco, pri kiu ni raportos en venonta numero de Tagiĝo.

El la planita programo ni nur mencias:

- Salutprelego de prezidanto de TKKE s. Vitek
- Prelego de J. Šustr, klubestro de esperantistoj en Praha
- Nuntempa stato de nia movado (ĈD Mařík)
- Agado en regiono Praha – (RD Novotný)
- Trarigardo de agado en ceteraj regionoj
- Kelkaj problemoj de nia laboro. Diskuto al aktualaj demandoj.
- Resumo de signifo de konferenco kaj perspektivoj de plua agado.

Mi esperas ke la regiona kunveno sukcesis.

Red.

## ANONCETOJ: -----

Karaj amikoj. Nia redakcio ricevis krom respondoj al pasintfoje publikigitaj anoncetoj tian amason da novaj anoncetoj, proponoj kaj petoj, ke ni estos devigitaj, pro tiu ĉi cirkonstanco, postuli por ĉiu linio da teksto almenaŭ 2 Kĉs. Sed, ĉar ni konscias nian devon: fidele servi al nia anaro, ni nuligis tiun ĉi decidon! Vi do libere povas skribi al ni kaj postuli publikigon de sia peto kaj anonco!

Respondo de SIAMO:

Signo: SIAMO – problemo  
motorciklo – Jawa 250 ccm

Ploras ni pro ĝojo dolĉa  
pro l' kompato via sorĉa!  
Dankon, doktoreto kara,  
Pro l' zorgo sanitara!

Kvankam du en unu korpo  
ne pezas nin fata sorto.  
Se vi rendevuon mendi volas  
ni ja ambaŭ veni povas!  
Siamaj ĝemeloj

Respondo al la anonceto:

“Bubo, trans ferdekon ĵetita ...”

Ho, sorto nia plenumiĝas, la stelkonstelacio ne mensogis, la eta hipopotamo en niaj sonĝoj ne trompis min! Vi venas, ho karulo kaj sola suno mia! Mi ofertas al vi junaĝon, kiu certe heligos vian ĝisnunan mornan vivon! Nia aĝdiferenco (mi naskiĝis en la jaro 1889, kaj kiam vi?) ne povas jam fremdigi nin. Pli detalajn informojn kaj gajan foton el via junaĝo sendu sub signo:

Stu Lto 00 – mondon regas!

Signo: Am OFo Bro – n-ro 77

“Iksoda operaciejo” ne povas trovi konvenajn vortojn por esprimi sian abonon rilate al anonceto de la VIRINAMANTOJ en T. nro 27. Vi, bubaĉoj malĝentilaj, ĉu oni proponas rendevuon por gazeto??? Se vi volas min kvietigi, sendu tuj skatolon da Džunka-cigaretoj!! (Ĉar de vi proponita mallongigo ne estas adekvata al efektiva situacio, ni proponas mallongigon novan: Amd ELi – Ro nro 88).

“Iksoda operaciejo”

Signo: Rana viv, la plezur,  
um kva kva kva kvakvakva ...  
Kun fanfaronuloj ni ne redevuas!!!

RANETOJ

Korespondantoj en Ĉeĥoslovakio serĉas:

Ladislav Tóth, Dozsa György 66, Hódmezővásárhely - Hungario